LSG **FORUMO** n-ro 133 (3/2006)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

## Ĉu la geedziĝo estas fundamenta ero de la socio? p 6

## UK-novaĵoj p 3

Riĉa programo:
Sabato 29 julio 3
Dimanĉo 30 julio 3
Lundo 31 julio 4
Merkredo 2 aŭgusto 4
Ĵaŭdo 3 aŭgusto 4



Eta rememorigo 2
Aliĝu al lsg-ano 2
Beletra niĉo 5
Fidiroj pri Gejfiera Defilado 5
Bonvenon al Kebeko 5
La plej malnova teksto pri samseksamo 8

## L. S. G.
## Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

**Retejo:** http://lsg-esperanto.org
**Adreso, retpoŝto:** Vidu ĉe la sekretario-kasisto sube.
**Membriĝo:** Kontaktu la sekr.-kasiston.
**Kotizo:** 10 EUR/1 jaro, 25 EUR/3 jaroj.

### ESTRARO

**Prezidanto:**
Arnold VICTOR, Apartment. 1,
160 West Eleventh Street, New York City, New York 10011, Usono;
arvimide(ĉe)earthlink.net
**Sekretario-kasisto:**
Rolf, Germanio;
lasekretario(ĉe)gmx.net /
lakasisto(ĉe)gmx.de
**Estrarano pri varbado:**
Francis, Francio;
fsoghomonian(ĉe)yahoo.fr
**Estrarano:**
Torstein, Norvegio;
kvakke(ĉe)hotmail.com
**Retprizorganto:**
Randy Dean, Usono;
randy.dean(ĉe)pobox.com


### FORUMO – membrogazeto de LSG N-ro 133 (3/2006)

**Adreso, retpoŝto, provizora redaktanto:**
Andreas, Svedio;
...@....com

**Kontribuoj** al la gazeto ĉiam bonvenaj. La gazeto aperas ankaŭ rete kiel PDF-dosiero. Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigitaj el la reta versio.

**Ekspedo de FORUMO:** La sekretario-kasisto, vidu supre.


## Eta rememorigo



Nun antaŭ la baldaŭ okazonta ĝeneralkunveno dum la UK en Florenco, mi nur volas rememorigi, ke mi povas resti kiel redaktanto nur ĝis Forumo 135. Se iu interesiĝas transpreni la taskon, ne hezitu anoncu vin dum la ĝeneralkunveno aŭ rekte al mi (adreso apude)! La ambicia nivelo de Forumo povas esti de simpla membrofolio ĝis moderna gazeto, ĉio laŭ via kapablo – la plej grava estas ke la bulteno aperos regule minumume 4 fojojn jare. Se vi anoncos vin jam nun, ni povas kunlabori pri la numeroj 134 kaj 135, se vi volas; tiel vi havos helpon dum la starto.

*Andreas*




## Aliĝu al lsg-ano

Nia diskutejo lsg-ano ade aktivas kun averaĝe 30 mesaĝoj ĉiumonate (sed nun dum la nordhemisfera somero la aktiveco nature estas malpli granda). Krom dum la UK:oj, la plejmulta aktiveco de la LSG-membroj troviĝas en tiu retlisto, kaj se vi ne estas ano de la listo, ni sugestas ke vi fariĝu (kondiĉe ke vi havas aliron al intereto). La aneco kostas nenion. En nia retejo http://lsg-esperanto.org > Diskutejo > Klarigoj vi povas legi kiel aliĝi al la diskutgrupo.

## UK-novaĵoj

### Sabato 29 julio

LSG en Movada Foiro:
Dum la Interkona Vespero en la UK de Florenco okazos foiro de organizoj por prezenti la gamon de Esperanta movada agado al novuloj kaj vizitantoj. Ĝi respondas al plendo de novbakita Esperantisto pri manko de informo pri la agado dum la gotenburga UK. Ankaŭ LSG prezentos sin en la foiro. La aranĝo okazos sur la herbejo antaŭ la kongresejo la 29 julio de 19h00 ĝis 21h00.

*Arnold VICTOR*




### Dimanĉo 30 julio

Tagon, horon kaj lokon por la ĝeneralkunveno:
Kiel kutime oni tion nur ekscias ”oficiale” lastmomente el la kongreslibro. Nia sekretario-kasisto mendis kiel kutime salonon por dimanĉo, por ke ni tuj komence de la kongreso konatiĝu. Do, vidu en la kongreslibro por precizaj informoj.

### Propono de tagordo (denove)

Jen la propono de tagordo denove, se vi perdis la antaŭan numeron de Forumo:

1) Elekti protokoliston, se la sekretario ne ĉeestas
2) Akcepti aŭ ŝanĝi la tagordon
3) Trovi raportistojn por:
   a) Kongresa Kuriero
   b) La Esperanta gazetaro
   c) Nacilingvaj gejaj gazetoj
4) Trakti la protokolon de la antaŭa ĝenerala kunveno
5) Trakti raporton kaj spezojn por la jaro
6) Trakti eventualajn landajn raportojn
7) Diskuti la agadojn de LSG kaj ĝian estontecon
8) Decidi la financan estontecon kaj la jarkotizon
9) Elekti Prezidanton, Kasiston, Sekretarion kaj maksimume 4 Komitatanojn
10) Debati eventualajn rezoluciojn
11) Eventualaj aliaj aferoj
12) Decidi pri dato kaj loko de venonta ĝenerala kunveno
13) Omaĝo al forpasintaj LSG-anoj
14) Fermi la kunvenon

### Lundo 31 julio

Akcepto en la GLAT-asocio ”IREOS” en Florenco (adreso: Via de’ Serragli 3):
– 19h00 akcepto kaj aperitivo
– prezento de la asociaj agadoj (kaj Ireos kaj LSG)
– sekvos bufeda vespermanĝo en la sama loko.

### Merkredo 2 aŭgusto

La ekskurso:
Mauro informis, ke komence de julio estas jam 15 sinanoncintaj partoprenontoj al la ekskurso Florenco–Lucca–Pizo–Torre del Lago–Florenco, do, la autobuso estas jam plena. Tamen, estas ŝanco ke – okaze de pli multaj venontaj petoj – oni povos mendi pli grandan buson. Se vi ankoraŭ ne anoncis vin, faru tion tuj, sed konsideru, ke novaj anoncintoj ricevos lokon nur se eblos.

Jen la ekskursa programo denove *kun kelkaj ŝanĝoj kaj aldonoj:*

### Ekskurso al Lucca – Pizo (Pisa) – Torre del Lago

Prezoj:
– veturo: de 28 ĝis 40 EUR, depende de la partoprenontoj (ju pli multaj ni estos, des malpli ni pagos);
– manĝo: laŭ propra volo. Ni proponas mem-servan restoracion, kie vi pagos 8 EUR aŭ pli, depende de via sato;
– enirbiletoj: en Lucca (laŭplaĉe) 2,00 EUR por la tombo de Ilaria Del Carretto (en la katedralo); en Piza (laŭplaĉe) 2,00 ĝis 15,00 EUR depende de la vizitotaj monumentoj, ni antaŭvidas viziti la Katedralon kaj la Baptisterion = 6,00 EUR.
– vespermanĝo en Torre del Lago en gejlesba restoracio. La prezoj estos atendeble pli altaj (de 15 ĝis 30 EUR); la vizito (laŭplaĉe) al Vilao de Puccini kostas 7,00 EUR, farebla nur se ni alvenos en Torre del Lago antaŭ la 18a.
Reveno plej malfrue je noktomezo.


Lucca

Bv anonci vin kiel eble plej baldaŭ al Mauro, retpoŝte: <maurort(ĉe)infinito.it> aŭ tuj kiam vi alvenos al la kongreso, por kapti liberan lokon!

*Mauro*

### Ĵaŭdo 3 aŭgusto

Informbudo de LSG:
Nia sekretario-kasisto mendis informbudon por LSG kiel kutime por la posttagmezo de la kongresa ĵaŭdo. Vi povas ricevi pli da informoj pri la aranĝo dum nia ĝeneralkunveno.



Arnold kaj Rolf en nia budo dum la gotenburga UK 2003

## Beletra niĉo



### PLENDO

Alaŭdo, birdo dolĉa
kantanta inter arbfolioj preĝantaj
via kanzono portas kvieton de arbaro
rakontante pri anima kaj korpa disiĝo.
Blinda voĉo, vin mi serĉas
en malhela mia memoro
serĉante sonojn de viaj paŝoj
kisojn kiuj velkadis matene je lipoj.
Mia sorto ondas
de unu bordo ĝis la alia
sed trovas mi nur ombrojn
de la pasinteco.....

*Princo*

## Fidiroj pri Gejfiera Defilado

Israela gazeto Ha'aretz en 5 julio aperigis anglalingvan artikolon laŭ kiu israela ĉefrabeno Amar alvokas la papon kondamni la laŭplane en aŭgusto okazontan Gejfieran Defiladon en Jerusalemo. Aliaj religiaj kaj ultraortodoksaj leĝfarantoj esprimis merkrede sian grandan konsterniĝon pri la planoj okazigi la nun ĉiujaran eventon en Jerusalemo. Parlamentano Nissim Ze'ev (de partio Shas) diris: "la geja defilado en Jerusalemo estas defilado de porkaĉaro sur la Templa Monto. Ĝi estas naŭziga defilado de mulpuraĵoj. Ĉu vi volas incendii Jerusalemon? Ĉu vi volas altrudi sur nin viajn seksajn inklinojn?" Aliaj parlamentanoj nomis tiujn komentojn incitaj. Al la judaj leĝfarantoj aliĝis ankaŭ islamaj religiaj gvidantoj. Islama parlamentano Ibrahim Tzartzur (de Ra'am-Ta'al) diris "en la araba societo ni ne renkontas tiun problemon. Ĝi estas malĝusta fenomeno, kiun oni ne devus validigi per permeso de la provoka defilado." Komitatestro pledis al la organizantoj de la defilado serioze pripensi, ĉu indus okazigi la defiladon en Jerusalemo pro la grava kontraŭstaro jam esprimita de gvidantoj de ĉiuj tri monoteistaj religioj. Parlamentano Ya'akov Margi (de Shas) diris "oni ankoraŭ ne konstatis, ĉu samsekseksamo estas malsano aŭ perversio. 'Fiero' estas malestiminda atributo, kiun oni devus elsarki." Reprezentanto de la israela geja/lesba/TG organizaĵo deklaris "Jerusalemo apartenas ne nur al vi. Kaj ni ne venis ĉi tien por seksumi sur la stratoj."

Fonto: http://www.haaretz.com/hasen/spages/734641.html

*Brian (el lsg-ano)*
*Vancouver: http://esperanto.memlink.ca*

## Bonvenon al Kebeko

Ĉi tiun someron estos la 30-jara datreveno de la Olimpikoj de 1976 en Montrealo. En 1976, Jean Drapeau, la tiama urbestro, pretigis la urbon ordonante ke polico balau ĝin, precize de gegejoj. Ironie, nun la Outgames (Malkaŝemulludoj) okazas en la sama loko kiel la Olimpikoj de 1976! Tiu ĉi internacia evento evidentigas la grandan progreson atingatan dank'al la kuraĝa strebado de fieraj gegejoj. Ili luktas de 40 jaroj por atingo de egalrajtoj kaj forigo de ĉia diskriminacio. Daŭra venkado permesis egalrajtigan statuton kiu ĉiel tuŝas nian vivon, tiom ke ni nun povas gejedziĝi se ni volas. Rezulte el la strebado por gejaj kaj lesbaj rajtoj, krom atingi

rimarkindajn leĝigojn, evoluis mensostato. En Kebeko, antaŭ jardekoj, ĉiu enketo montras ke toleremo kaj konsento progresas. La situacio ankoraŭ ne estas perfekta ĉar ekzistas diskreta samseksemulfobio. Tamen, en Kebeko, specife en Montrealo, ekzistas lokoj kie gejoj vivas ekzemplodone libere kaj malkaŝe. Ni deziras ke tiel estu en la tuta mondo. Sed en multaj landoj obstakloj baras al niaj gefratoj la vojon al libereco. Inter tiuj obstakloj troviĝas politikaj kaj religiaj diktaturoj. La sperto de strebantoj tra la mondo helpis al gegejoj ĉi-tie atingi rimarkindajn rajtojn kaj liberon. Do, ĝojigas nin partopreni ĉi tiun liberecon kun niaj gastoj internaciaj, dezirante ke nia sperto, ula kaj ara, inspiru tiujn multnombrajn gegejojn kiu volas vivi en pli kaj pli da toleremo.

*Alain Bouchard el RG – La revue gaie des Québécois, traduko Carlos*

## Ĉu la geedziĝo estas fundamenta ero de la socio?

Pro la deklaroj disŝutitaj en la amaskomunikiloj, mi sentas min devigata – kiel hispano kaj samseksemulo – elmontri mian vidpunkton por refuti al la reakciuloj en ĉi tiu socio, kiuj provas torpedi kaj bojkoti la ŝanĝon en la hispana leĝaro, kiu permesas al samseksemuloj kunedziĝi.

Ili diras, ke edziĝo estis, estas kaj estos nur por la unuiĝo de viro kaj virino kun la celo generi gefilojn kaj protekti la gefilojn. El tiu eldiro oni ja povus dedukti, ke antaŭ la ekzisto de la geedziĝo ne ekzistis gefiloj, en la senco de familianoj. Vi povas samopinii, ke la argumento estas almenaŭ ridinda, ĉar la apero de la unuaj prahomoj okazis pli-malpli antaŭ ol sep milionoj da jaroj[1] kaj kompreneble ili naskis idojn. Mi demandas, ĉu la idoj ne estis iliaj gefiloj ĉar tiuj prahomoj ne estis geedziĝintaj?

Mi antaŭeniras iom tra la historio ĝis la unuaj urbaj civilizacioj ĉe la periodo de neolitiko, ĉ. 5000 a.K. Tiuj civilizacioj ne multe diferenciĝis de la ĉas-kolektantaj triboj kaj iliaj socioj, bazitaj de la tribo, klano aŭ la grupo. Ĉi tiuj lastaj baziĝis sur patrinaj socisistemoj, kie virinoj estis la centro de la vivo pro ilia "mistika" povo naski, kaj kie oni kredis, ke la viro neniel rolis, aŭ almenaŭ tre malmulte. Por generi, ĉiuj klanaj virinoj kunvenis kun la viroj por kopulacii sur la tero kaj tiel la idoj naskiĝis el ŝia fekundeco, virino = ŝi kaj Tero = ŝi. Mi demandas, ĉu la gefiloj el tiuj kopulacioj estis gefiloj aŭ ne? Ĉu ili estis senhelpataj de la socia unuo? Kaj kie estis la vira rilato?

La respondoj de tiuj demandoj estas: la infanoj estis gefiloj por ĉiuj anoj de la socio kaj ili estis edukitaj de la virinoj. Sed kiam la viro komencis kompreni, ke li iel rolis en la genero de idoj, ke sen lia partopreno generado ne eblis, li volis ke liaj infanoj estu de li, kaj ne de ĉiuj, kaj pro tio li elpensis la geedziĝon.

La vorto por geedziĝo en pluraj okcidentaj lingvoj estas derivita el la greka ματριμόνος (matri-monos), tio estas: sola patrino. Oni tiel garantiis nur ke la filo apartenis al kaj naskiĝis el la utero de sola virino, ne de sola viro. Por ke la viro estu tute ligita al la gefiloj, aperis la geedziĝo; do, ĝia origino estas simple homa kaj ĝia rito estas nur por socie starigi unuigon fare de la homoj kaj ne far iu ajn dio. En sia propra intereso la viro, celante eternigi siajn proprajn atingojn, leĝe ligis ilin al sia propra familio, kaj ne al nekonatuloj, kaj pro tio la geedziĝo estis kreita. Sed

antaŭ tiam (ĉ. 5000 a.K.) la homaj estaĵoj naskiĝis, vivis, mortis kaj generis dum ĉirkaŭ 7 milionoj da jaroj sen zorgi ĉu ili estas edziĝintaj aŭ ne, aŭ ĉu la gefiloj estas helpitaj de ia leĝo aŭ ne.

Estas klare, ke tra la jarcentoj la geedziĝo ŝanĝiĝadis laŭ la percepto de unuopuloj kaj de socioj, almenaŭ en Okcidentujo. Edziĝo ne plu estas unuiĝo ĉefe por generado kaj defendado de la familihavaĵoj, sed pli-malpli unuiĝo de du homoj, kiuj reciproke sin amas, por la plenumado de siaj teneraj deziroj. Oni aldonu ke la kvanto de gefiloj ekstergeedziĝe naskitaj plimultiĝas ĉiutage – almenaŭ en Okcidentujo – kaj malgraŭ tio la infanoj ne suferas, ĉar ili estas helpataj de la socio en kiu ili naskiĝis – ankoraŭ almenaŭ en Okcidentujo. Geedziĝon oni povas kompreni kiel kontrakton kaj ne kiel bazan eron de la socio.

Mi perfekte komprenas ke ankoraŭ estas kredoj kaj religioj kaj anoj de tiuj, kiuj pensas ke ĉio ankoraŭ estas kiel antaŭe estis, kaj mi respektas ilin. Sed mi neniam povus respekti trudadon de iliaj idearoj. Private la religia libero garantias, ke ili povas konduti laŭvole, kondiĉe ke ili ne malobservas la leĝojn aŭ damaĝas aliajn, sed publike ili devas obei la pozitivajn leĝojn kaj senescepte apliki ilin. Kiel bone diris hispana politikisto: ”Kiu ne kunedzigos du homojn ĉar ili estas samseksaj estas kiel ulo, kiu rifuzas kunedzigi homojn pro ilia haŭtkoloro”. La ago estas la sama: diskriminacio pro esti malsamaj. Kaj kiam mia urbestro rifuzos edzigi nin, argumentante ke li povas rifuzi pro la rajto de konscienclibero, mia konscienclibero diras ke mi ĉesu pagi la municipajn impostojn, ĉar la institucio, kiu devas apliki kaj permesi al mi efektivigi la rajton, nek helpas min nek plenumas siajn devojn. Mi estas ano de socio kaj el ĝi spruĉis parlamento, kiu decidis pri la leĝo, do, ili devas plenumi la leĝon, kiun ni donis al ni mem. Mi amas viron al kiu mi volas edziĝi, sed tio ne rajtigas al vi diri al mi kiun aŭ kiel mi devas ami. Ankaŭ mi ne rajtas tion diri al vi, sed se vi obstinas, ankaŭ mi devas diri mian opinion pri viaj preferoj.



Sed ne miskomprenu, mi defendas la edziĝon, sed por tiuj, kiuj unuiĝas ĉar ili reciproke sin amas. Do, edziĝo estas baza ero de la socio en formo de unuiĝo regulata de leĝoj, sed ĝi ne estas dogma rito ŝprucita el moralo, sed el la baza intereso de la partoprenantoj kaj el la homa racio. Do, estas ĝuste diri ke edziĝo estas pagana tradicio, kiu neniel tuŝas la ekleziojn aŭ la religiojn, kaj kiu, kiam tiuj alvenis al la ”edziĝmerkato”, jam ekzistis antaŭ kvin mil jaroj. Ne distordu, sed alkutimiĝu al la realo kaj ĝia natura evoluado.

*Simayre, Hispanio*

[1] Laŭ la lastaj datumoj de la franca paleontologisto Michel Brunet ĉe la Universitato de Poitiers, Francio.

Noto de red.: la artikolo estas mallongigita kaj lingve redaktita.



## La plej malnova teksto pri samseksamo

*Jen teksto iam sendita al nia sekretario, eble io por la lingvointeresitaj legantoj de Forumo.*

La plej malnova dokumento de samseksamo troviĝas en paragrafo el la mez-asiriaj leĝoj (1450-1250 antaŭ nia erao). Asiria estas dialekto de la akada lingvo (la alia dialekto estas la babilona). Mez-asiria oni nomas la tempon inter 1600 kaj 1000 antaŭ nia erao. Eble la plej malnova dokumento de samseksamo, kvankam ne pozitiva.

Transliterado: šum-ma a'īlu tap-pa-a-šš i-ni-ik ub-ta-e-ru-ú-uš uk-ta-i-nu-ú-uš i-ni-ik-ku-ú-uš a-na šá re-še-en u-tar-ru-uš.

Transskribado: Šumma a'īlu tappašu inīk ubta''erūš ukta''inūš inikkūš ana ša rēšēn utarrūš.

Prononco: 'Ŝumma a'ilu 'tap-paŝu i'nik ubta-e'ruŝ ukta-i'nuŝ inik-'kuŝ ana ŝa re'ŝen u'tar-ruŝ.

Traduko: Se homo sekskuniĝas kun sia kamarado (kaj) oni konviktas lin (aŭ) pruvas (tion) al li, oni sekskuniĝu kun li (kaj) igu lin eŭnuko.

Vortaro:

| | |
|---|---|
| šumma | se |
| a'īlu | homo |
| tappašu | kun kamarado sia (laŭvorte: kamaradon sian) |
| inīk | sekskuniĝas (preterito kun prezenca signifo!) |
| ubta''erūš | oni (laŭvorte: ili) estis konviktantaj lin |
| ukta''inūš | oni (laŭvorte: ili) estis pruvantaj al li |
| inikkūš | oni (laŭvorte: ili) sekskuniĝos kun li |
| ana | al |
| ša rēšēn | kastrito, eŭnuko |
| utarrūš | igu lin |

